



BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 3/2002(166)

Listopad/novembro 2002

Enhavo - obsah:

| | |
|--|---|
| Manifesto de Prago - Pražský manifest | 1 |
| Saluto de kardinalo Vlč | 4 |
| Z. Bergrová: La kolrimeno de Bariko | 5 |
| J. Wolker: Balado pri okuloj de hejtisto | 8 |
| Ĉeĥaj primovadaj informoj | 9 |

Manifesto de Prago

Manifesto de la movado por la Internacia Lingvo Esperanto proklamita en la 81-a UK de Esperanto en Prago en la jaro 1996-a

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, direktas ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizoj, kaj homoj de bona volo, deklaras nian intencon firmvole plulabori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nunacoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

Pražský manifest

Manifest esperantského hnutí vyhlášený na 81. světovém kongresu esperanta v Praze v r. 1996

My, členové celosvětového hnutí za rozšíření esperanta, *obracíme se* tímto manifestem na všechny vlády, mezinárodní organizace a lidi dobré vůle, prohlašujeme svůj úmysl pokračovat usilovně v činnosti za uskutečnění cílů zde uvedených a vyzýváme organizace a jednotlivce, aby se připojili k našim snahám.

Esperanto, publikované v r. 1887 jako projekt pomocného jazyka pro mezinárodní komunikaci, se záhy vyvinulo v živou a bohatou řeč, která již více než století slouží sbližování lidí jako most nad překážkami danými růzností jazyků a kultur. Cíle jeho mluvčích za tuto dobu neztratily na závažnosti a aktuálnosti. Ani celosvětové používání několika národních jazyků, ani pokroky v komunikační technice, ani nové metody jazykového vyučování velmi pravděpodobně neuskuteční následující principy, které považujeme za zcela zásadní pro spravedlivý a efektivní jazykový řád.

1. **Demokratio.** Komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sféro de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la intemacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. **Transnacia edukado.** Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple la lerneĵano, kiu studas la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentigas kiel hejmo.

Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. **Pedagogia efikeco.** Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. **Plurlingveco.** La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvo-komunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komimumano akceptis la taskon lemi almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

1. **Demokracie.** Komunikaĉni sistém, ktery doživotně některé lidi privileguje a zároveň od ostatních vyžaduje, aby k získám schopnosti komunikovat v jiném jazyce - a přitom na nižší úrovni - vynakládali mnohaleté úsilí, je hluboce protidemokratický. I když esperanto -jako ostatně žádný jazyk - není úplně dokonalé, přesto značně převyšuje své rivaly v oblasti rovnoprávné celosvětové komunikace.

Tvrdíme, že jazyková nerovnost vede ke komunikaĉni nerovnosti na všech úrovních, včetně úrovně mezinárodní. Jsme hnutí za demokratickou komunikaci.

2. **Nadnárodní výchova.** Každý etnický jazyk je vázán na určitou kulturu a národnost, případně národnosti. Např. žák, který se učí anglicky, se spolu s jazykem učí kultuře, zeměpisu a politice anglofonních zemí, především Spojených států a Velké Británie. Žák, který se učí esperantu, se učí o světě bez ohledu na jakékoliv hranice, o světě, kde má svůj domov každá země.

Tvrdíme, že výchova v kterémkoliv etnickém jazyce je vázána na určitý způsob nazírání na svět. Jsme hnutí pro nadnárodní výchovu.

3. **Pedagogická účinnost.** Jen malé procento těch, kdo se učí cizímu jazyku, ho skutečně zvládne. Úplné zvládnutí esperanta je možné i pro samouka. Různé studie prokázaly propedeutickou hodnotu esperanta pro učení se dalším jazykům. Esperanto se dopomáhá také jako základní prvek v jazykových kurzech, neboť se jím vytváří u žáků základní jazykové povědomí.

Tvrdíme, že nesnadnost etnických jazyků bude vždy představovat pro mnoho žáků značnou překážku. A právě jim by znalost dalšího jazyka byla iai prospěchu. Jsme hnutí pro účinné jazykové vyučování.

4. **Vícejazyčnost.** Esperantské spoleĉenství je jedním z mála jazykových spoleĉenství celosvětového dosahu, jehož mluvčí jsou bez výjimky dvoujazyční či vícejazyční. Každý příslušník tohoto spoleĉenství na sebe vzal úkol naučit se alespoň jednomu cizímu jazyku až na aktivní úroveň. V mnoha případech to vede i k zvládnutí dalších jazyků a k lásce k nim, jakož i k rozšíření osobního rozhledu.

Tvrdíme, že příslušníci všech jazyků, velkých i malých, by měli mít reálnou šanci zvládnout další jazyk na vysoké komunikaĉní úrovni. Jsme hnutí za poskytnutí této šance.

5. Lingvaj rajtoj. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproká volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimatajn en tiom da intemaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivajospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al jbrmorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povoŝn komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciaj projektoj de la homa emancipiĝo - projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homa komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loká kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

5. Jazyková práva. Nerovné rozdělení moci mezi jazyky vyvolává u velké části obyvatel světa trvalou jazykovou nejistotu a vede dokonce k přímému jazykovému útlaku. V esperantském společenství se mluvčí jazyků velkých i malých, oficiálních i neoficiálních, setkávají na neutrální půdě díky vstřícné vůli k vzájemným kompromisům. Taková rovnováha mezi jazykovými právy a odpovědnostmi vytváří precedens dalšího vývoje a hodnocení jiných řešení jazykové nerovnosti a jazykových konfliktů.

Tvrdíme, že obrovské rozdíly v politické síle jazyků podkopávají záruky, vyjadřované v tolika mezinárodních dokumentech, že se se všemi lidmi bude jednat stejně, bez ohledu na jejich mateřštinu. Jsme hnutí za jazyková práva.

6. Jazyková různost. Vlády často považují velkou různost jazyků na světě za překážku pro komunikaci a rozvoj. Naproti tomu*pro esperantské společenství je jazyková různost trvalým a nepostradatelným zdrojem bohatství. Proto je každý jazyk, stejně jako každý

živočišný druh, hodnotou sám o sobě a zaslouží si ochranu a podporu.

Tvrdíme, že politika komunikace a rozvoje, pokud není založena na respektování a podpoře všech jazyků, odsuzuje většinu jazyků světa k zániku. Jsme hnutí za jazykovou různost.

7. Lidská emancipace. Každý jazyk své příslušníky osvobozuje a zároveň vězní, neboť jim poskytuje možnost vzájemně komunikovat, avšak brání komunikaci s jinojazyčným světem. Esperanto, plánované jako univerzální mezinárodní dorozumívací prostředek, je jedním z velkých fungujících projektů lidské emancipace - projektem, který umožňuje každému člověku účastnit se jako jednotlivec světového lidského společenství, s pevnými kořeny ve své místní kultuře a jazyce, které ho však přitom nikterak neomezují.

Tvrdíme, že výlučné používání etnických jazyků staví nevyhnutelně hráze svobodě sebevyjadřování, komunikace a začleňování do celosvětového společenství. Jsme hnutí za lidskou emancipaci.

La 55-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazis en Kroměříž de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2002.

Ni prezentas parton el la saluto, kiun al la kongresanoj sendis Lia Eminenco Miloslav Kardinalo Vlk, ĉefepiskopo de Prago kaj Primaso ĉeĥa.

Karaj gesamideanoj, volonte mi okaze de tiu aranĝo rememoras la tempon antaŭ pli ol kvindek jaroj, kiam ni post 2-a mondmilito estis liberigitaj de naziismo kaj antaŭ ni malfermiĝis nova spaco de libereco kaj eblecoj de la kontaktoj kun la mondo.

Tiam mi estis komencanta gimnazia studento en České Budějovice, plena de elano kaj sopiro pri ekkonado de la mondo. Kaj fakte. Post trafekventado de lingvaj kursoj de Esperanto - kaj eĉ de la Somera Lemejo por E-instruistoj - mi pere de adresoj en diversaj Esperanto-gazetoj disvolvis riĉan korespon-dadon - malgraŭ tio, ke pli poste tio al komimista reĝimo ne tro plaĉis; ĝi strebis nin apartigi de la mondo kaj malebligi la kontaktojn...

Kúro de la historio, evoluo de la scienco kaj tekmmo, ekonomio kaj politiko generále montras, ke la mondo ĉiam pli proksimiĝas en globalan (tutecan) fazón de sia evoluo, kiu strebas superi ĉiujn bremsantajn barierojn, eksterajn kaj intemajn. Al la unuaj barieroj apartenas ne nur malriĉeco de la granda parto de la homaro, sed ankaŭ la lingvaj barieroj, kiuj al multaj malhelpas partoprenon je bonecoj de la globala disvolviĝo. Al la duaj barieroj - eble ankoraŭ pli gravaj - apartenas egoismo kaj malamo. Ideo de la internacia lingvo Esperanto efektiviĝas strebadon pri forigo de la barieroj de ambaŭ specoj. ŝi akcentigas spiritan pbproksimiĝon, amikecon kaj unuecon de unuopuloj kaj la nacioj, kiel gravan antaŭkondiĉon de la plua evoluado.

Mi deziras al la 55-a Kongreso de IKUE sm ĉi tiu vojo multajn sukcesojn kaj mi.benas strebadon de la esperantistoj.

Miloslav Kardinalo Vlk,
Ĉefepiskopo de Prago kaj Primaso Ĉeĥa
(laŭ la gazeto Dio Benu)

La prezidento de Ĉeĥa Respubliko Václav Havel dekoraciis la 28-an de oktobro per Ordeno de T. G. Masaryk la ĉefepiskopon de Prago Miloslav Vlk.

55. sjezd Mezinárodního katolického svazu esperantistů se konal v Kroměříži od 20. do 27. Července 2002.

Přinášíme část pozdravu, který účastníkům sjezdu zaslala Jeho Eminence Miloslav kardinál Vlk, arcibiskup pražský a primas český.

Draží přátelé, u příležitosti tohoto sjezdu rád vzpomínám na dobu před více než padesáti lety, když jsme po druhé světové válce byli osvobozeni od nacizmu a před námi se otevřel nový prostor svobody a možnosti styků se světem.

Tehdy jsem byl začínajícím gymnazijním studentem v Českých Budějovicích, plný elánu a touhy po poznání světa. A opravdu. Po absolvování jazykových kursů esperanta - a i Letní školy pro učitele esperanta - pomocí adres v různých esperantských časopisech jsem rozvinul bohatou korespondenci - přesto, že se to později komunistickému režimu nepřilíhalo; snažil se nás oddělit od světa a znemožnit nám kontakty...

Běh dějin, vývoj vědy a techniky, hospodářství a politiky, všeobecně ukazují, že svět se stále více přibližuje globální (celistvé) fázi svého vývoje, který se snaží překonat všechny brzdicí překážky, vnější a vnitřní. K prvním překážkám patří nejen chudoba velké části lidstva, ale také jazykové překážky, které mnohým brání podílet se na dobru globálního rozvoje. K druhým překážkám -možná ještě důležitějším - patří sobectví a nenávisť. Myšlenka mezinárodního jazyka esperanta uskutečňuje úsilí o odstranění překážek obou druhů. Zdůrazňuje duchovní přiblížení, přátelství a jednom jednotlivců a národů, jakožto důležitou podmínku dalšího vývoje.

Přeji 55. sjezdu Mezinárodního katolického svazu esperantistů na této cestě mnoho úspěchů a žehnám úsilí esperantistů.

Miloslav kardinál Vlk,
arcibiskup pražský a primas český

(podle časopisu českých katolických esperantistů Dio Benu)

Prezident republiky Václav Havel vyznamenal 28. října Řádem T. G. Masaryka arcibiskupa pražského Miloslava Vlka.

Z. Bergrová

La kolrimeno de Bariko

Foje estis iu hundo. Ĝi havis fidelajn brunajn okulojn, malvarman nazon, viglajn orelojn, mikskoloran hararon, ĝi estis granda kaj forta. Oni donis al ĝi la nomon Bariko. Ĉar ĝi estis saĝa, oni prenis ĝin en hundlernejon, por ke ĝi fariĝu gvidanto de blindaj homoj. Oni instruis ĝin, ke oni transiras ŝoseon nur kiam estas la verda signallumo, ke ĝi devas sian mastron gardi. Sed kial oni baptis ĝin Bariko. Interesiĝis pri ĝi sinjoro Dvořák, tiu havis maljunan blindan panjon. Ŝia gvidhundo Bariko mortis, ĉar la hundoj havas malpli longan vivon ol la homoj. Ĝi estis simila al la nia. Por ke la maljuna sinjorino ne devu kutimiĝi al alia nomo, nia Bariko ricevis la nomon laŭ ĝi.

Kiam sinjoro Dvořák estis forkondukanta Barikon, li ektrenis rigore la rimenon. Bariko malgaje postrigardis sian instruiston kaj siajn hundkamaradojn.

Sed la konatiĝo kun la maljuna sinjorino Dvořák estis gaja. Bariko mallaŭte ekbojis. Ŝi malfermis siajn brakojn, Bariko iris al ŝi tiel proksime, ĝis ĝi iom tuŝis ŝin. Ŝi ekkaptis ĝin kaj karesis. Al tiom granda tenero Bariko eĉ ne estis alkutimiĝinta. Sed tio plaĉis al ĝi tre multe. Tiel fariĝis el ili amikoj. La sinjorino havis ĝardeneton, en tiu Bariko povis petoli, kiel ĝi volis. Iam venis nepoj, tiam estis kurado, alportado de bastonoj kaj tiaj drolaĵoj, nu pompe! Kaj en tiun ĉi feliĉon subite trafis fulmo.

La maljuna sinjorino sidis ĉe tablo kaj deglitis sur la plankon. Bariko tuj proksimiĝis, iom jelpetis, poste bojetis, poste jam intensive bojis, ĝi ekkomprenis, ke okazis io serioza, io, kion li devus konigi al sinjoro Dvořák, nur ĝi ne sciis kiel. Ĝi levis aŭdilon, kiun ĝi ĉiam donis al sinjorino Dvořák, sed ŝi ne prenis ĝin. Tial ĝi vane bojis en ĝin. Oni ne instruis ĝin turni numeron, oni eĉ ne havis ideon pri tio.

Fine ekkraketis ŝlosilo en la seruro kaj venis sinjoro Dvořák. Bariko soifis, sed tio estus eltenebla, ĝi eĉ ne moviĝis de la sinjorino. Sed poste okazis nuraj malbonaj aferoj. Trinki ja ili donis al ĝi, sed la sinjorino oni forportis. Bariko jam sciis, ke ŝi mortis. Sinjoro Dvořák ŝlisis, forprenis la kolrimenon de Bariko, enaŭtigis ĝin kiel ian objekton kaj ekveturis. Li veturis longe, ĝis ili estis en arbaro. Tie sinjoro Dvořák haltis, Barikon elpelis, sed li mem restis

en la aŭtomobilo. Bariko mirigita kaj afliktita rigardis, kion li faras, li startigis kaj forveturis...

Kion nun... Bariko ĉirkaŭrigardis, ĉirkaŭe estis arbaro kaj ŝoseo. Ĝi mallevis la kapon kaj ekiris laŭ ĝi... Ĝi iris longe, trinkis el pluvmarĉeto, ĝi ŝajnis al ĝi pura. Ĝi jam eksentis malsaton, pretere veturis kelkaj aŭtoj, ĝi bojis al ili, sed neniu haltis, neniu demandis – Bariko, kion ci bezonas? Ĉu ci manĝis, trinkis, tute ne.

Poste proksime ĉe la ŝoseo aperis konstruaĵo. Bariko flankeniĝis laŭ la vojo al ĝi. La dometo havis super la pordo kornaron, ĝi estis arbarista domo. Bariko iris pli kaj pli proksimen, subite el budeto ĉe la domo sin antaŭenĵetis kolego hundo kaj malamike bojis.

“Kial ci frenezas,” rebate ekbojis Bariko. Sed la bojohundo kvazaŭ ne komprenus ĝin. Ĝi bojis kaj bojis kiel konfuziĝinta.

Eliris virino.

“Tonĉjo, estas ĉi tie ia hundo,” ŝi vokis en la domon.

“Kia,” aŭdiĝis el la interno.

“Granda, ni ne konas ĝin,” respondis la virino.

El la dometo eliris barbohava viro kaj havis fusilon.

“Sakre,” li diris, “denove vaga hundo.”

“Eble ĝi ne estas vaga,” kontraŭdiris la virino, “eble ĝi estas de iuj el urbo. Nun dum la libertempo ili estas multaj ĉi tie...”

“Ĝi ne havas kolrimenon kaj markon. Evidente vagulo,” diris la viro. “La homoj, kiuj elĵetas ilin el aŭtomobiloj, ne havas konsciencon.”

“Ne ŝajnas, ke ĝi estus sovaĝiĝinta,” defendis Barikon la virino.

“Sovaĝiĝinta nesovaĝiĝinta,” ekmurmuris la viro. “Vagaj hundoj timigas la bestaron.”

“Ĉu vi pafmortigos ĝin?” demandis la virino.

“Mi devus,” deklaris la viro.

“Ne, ni ja nenion scias pri ĝi...”

“Scias, ne scias, mi devas vagajn hundojn pafmortigi,” diris la viro kaj celis.

Bariko ne sciis, kion fari, ankoraŭ neniam iu celis al li per fusilo, pro certeco li ekfuĝis. Kaj la viro efektive ekpafis, sed malfracis. La fusilo ne obeis lin. Ĝi estis fusilo, kiu pensis. Tiaj fusiloj ne estas multaj, sed en fabeloj ili troviĝas.

Estas malbone, pensis Bariko. Homoj estas ankaŭ malbonaj. Sinjoro Dvořák ne estis dankema al ĝi, ke ĝi zorgis pri lia panjo. Kaj la barbohava viro en la arbaristejo volis ĝin pro

nenio pafmortigi...

Antaŭ ol ĝi venis en vilaĝon, ĝi sentis jam kruelan malsaton... Sur la placo areto da infanoj pretigis sin ien ekiri. Bariko ne sciis – ĉu la infanoj estas malbonaj aŭ bonaj... Ĝi haltis kaj ŭais.

“Jen hundo,” diris Aleŝ.

La bubinoj kaj buboj turnis sin al Bariko. Ĝi rigardis ilin kun espero. Dano klinis sin por io, Bariko iom konvulsie moviĝis, sed Dano ne ĵetis ŝtonon sur ĝin. Li ĵetis flanken bastonon. Aha, ekkomprenis Bariko kaj ĵetis sin post la bastono, kaptis ĝin en la buŝon, alportis ĝin al Dano kaj metis ĝin al liaj piedoj.

“Bone,” diris Dano. Ĉiuj ekridis.

“Venu ĉi tien, vilulo,” diris Božka, sed verdire ŝi mem iris al Bariko kaj karesis ĝin. Ĝi tute ekremetis kaj ekmurmuretis. Ĝi malsatis kaj ne sciis, kiel tion diri.

Klara mem ekhavis la ideon. Ŝi elpakis intermanĝon kaj proponis al Bariko pecon da buterpano kun salamo. Ĝi forglutis ĝin kaj dankeme ĝi lekis ŝian manon.

“Sakre, ĝi havis apetiton,” diris Aleŝ.

“Eble ĝi malsatis,” rimarkigis Mikaelo. “Kies ĝi estas?”

“Ĝi devus havi markon sur kolrimeno,” konsideris Helena.

“Ĉu vi ne vidas, ĝi havas nenian kolrimenon,” huis Dano.

“Nu jes, moŝtoj, ĝi estas senhejmulo,” konfirmis Patriko, “ni povas preni ĝin.”

“Sed...” ekis frazon Božka.

“Neniajn parolojn, ni iros al la ludejo eĉ kun ĝi,” decidis Patriko.

Kaj tiel ĉiuj ekpaŝis al la ludejo kaj restis tie ĝis vespero. Kun Bariko ili jam amikiĝis. Sed poste venis la vico de la – sed...

“Kie ĝi dormos?” findiris nun Božka.

“Kiu povas preni ĝin hejmen,” disvolvis la demandon Karlo. “Mi ne povas, paĉjo elĵetus min kun ĝi.”

“Mi prenos ĝin,” diris Klara kaj la infanoj iris hejmen.

Kiam ili estis disirantaj al diversaj domoj, Bariko iris ĉiam kun tiuj, kiuj restis. Fine adiaŭis Božka kaj Klara, kaj tiam Klara retenis ĝin, ĉar ĝi erare estus iranta post Božka...

“Panjo,” diris Klara tuj en la pordo, “mi havas hundon.”

“Kion vi havas?” demandis distrite ŝia panjo.

“Nu hundon. Rigardu, ĝi estas bona kaj mi

volas ĝin.”

“Pro Dio, tia granda kiel bovido. Kaj entute – kies ĝi estas? Kiel vi akiris ĝin?”

“Ĝi ne havas kolrimenon kaj estis tiom malsata, ke ĝi formanĝis tri intermanĝojn.”

“Evidente ankaŭ la vian,” severiĝis la panjo.

“Ni interdividis la restintajn, sed mi jam denove manĝus kaj ĝi ankaŭ.”

“Aŭskultu, Klara, morgaŭ vi forkondukos ĝin,” ordonis la panjo kaj ĉe tio ŝi preparis vespermanĝon por ambaŭ.

“Mi tenos ĝin mi,” rezistis Klara. “Kiam mi estis malsana, tiam vi hundon promesis al mi.”

“Nu jes, sed kion diros la paĉjo, tiu ĉi estas terure granda.”

“Do mi manĝos malpli multe, por ke restu por ĝi.”

“Sensencaĵoj, pri peco da manĝaĵo ne temas, sed en Prago estas multege da hundoj, eble ĝi interbatiĝus, kaj ni devus anonci ĝin en oficejo, kaj kiu scias, ĉu ĝi estas sana kaj entute...”

Klara komencis plormieni.

“Do bone, ni provos tion,” diris la panjo.

Sed baldaŭ tio finiĝis alimaniere.

En la vilaĝon venis cirko. Ne ia granda, nur cirkestro kaj lia filineto Esmeralda. Tio estis ŝia artista nomo laŭ Esmeralda en Vendita fianĉino. Bariko ankoraŭ ne estis anoncita, ĉi tie en la vilaĝo oni eĉ ne povis anonci ĝin, tial li estis sen kolrimeno kaj sen marko. Kun Klara li facile interkompreniĝis, ĝi al kutimiĝis al tio, ke nun ĝi havas nomon Lordo, ĉe ĉiuj infanoj ĝi provis gajni ilian favoron, ĝi estis dankema, ke ili zorgis pri ĝi. Kun Esmeralda ĝi estis malbonŝanca. Ŝi rimarkis, kiel Bariko estas lerta jak kiel ĝi scipovas, kion ceteraj hundoj ne scipovas. Ŝi ankoraŭ iom alinstruis al ĝi, ekzemple stari longe sur la malantaŭaj kruroj jak danci. Al infanoj tio plaĉis, ili ridis, Bariko-Lordo kun ili. La hundoj scipovas ridi, nur atentu ilin. Ĉe tio ĝi elŝovis la langon jak estis feliĉa.

Kaj foje la cirkestro kun Esmeralda antaŭmatene malaperis el la vilaĝo. Jak Bariko-Lordo kun ili. Klara serĉis ĝin, vokis, ploris, nur malfrue ŝi ekkomprenis, ke Esmeralda forveturigis ĝin. Ŝi kuris al stacidomo, jes, sinjoro ekspedisto konfirmis, ke kun la cirkestro jak kun Esmeralda forveturis ankaŭ hundo. Kien ili veturis, sinjoro ekspedisto ne sciis, sinjorino kasistino tion ne memoris, ĉar per trajno veturas multe da homoj. La panjo promesis al Klara

alian hundon, ŝi diris, ke tiu estos fidela.

Sed Bariko-Lordo ne estis malfidela al Klara. Ekkompreninte, ke ili veturos per trajno, ĝi komencis defendi sin, sed Esmeralda certigis ĝin, ke estas nur amuziĝo, ke ili denove revenos en la vilaĝon. Tial ĝi kredis al ŝi. Sed ili ne revenis. Kaj ili estis jam sur la kvara loko. Kaj tie Bariko-Lordo sukcesis fuĝi.

Ĝi povrulo iris reen laŭ reloj, eble eĉ ĝusta-direkte, sed kiom tio utilis, ĝi estis malproksime. Kaj ree ĝi malsatis kaj soifis. Ĝi venis en vilaĝon, en alian, ol el kiu ĝi kun Esmeralda forveturis. Estis tie rivero, sur la bordo kelkaj homoj kaj infanoj estis sunbruniĝ-antaj kaj naĝantaj. Bariko-Lordo tuj rimarkis, ke unu knabo havas pli nigrajn okulvitrojn ol la aliaj, ke li estas blinda. Ĝi rimarkis ankaŭ, ke ĉe unu vesto-amaseto neniu estas, eble ĉiuj estis en la akvo. Ĝi eltiris el la amaseto paketon da manĝaĵo kaj lerte ĝin forportis en salikejon. Ĝi luktis kun la pakumo kaj ĉion for-manĝis, kontente ĝi lekis la buŝon. Kaj ŝajnis, kvazaŭ nenio okazus.

Kaj poste okazis jeno. La knabo, kiu havis tute nigrajn okulvitrojn, komencis en la akvo droni... En tiu momento li estis sola. Bariko-Lordo tion rimarkis la unua – kaj jam ĝi estis ĉe li. Ĝi kaptis la bubon lerte je la hararo, por ke li havu la kapon super la akvo, kaj naĝis kun li al la bordo. Sur la bordo li kuŝigis la bubon kaj scivoleme rigardis, kio estos plu. Ili turnis la bubon per buŝo malsupren, li kraĉis akvon, tuis, ili vokis al li Georgo, Georgo, kaj jam estis venkate. Barikon-Lordon ili rimarkis nur nun.

“Kies estas la hundo?” demandis la paĉjo de Georgo. Neniu aŭdigis sin.

“Ĝi ja tamen devas ies esti,” daŭrigis la paĉjo. Ree neniu eĉ vorton.

Estos batregalo, ekpensis Bariko-Lordo kaj pretigis sin por fuĝi, ĉar post kiam oni trovos, ke li formanĝis la manĝaĵon, estos eble malbone. Sed neniu ekpensis pri la manĝaĵo, ĉiuj ariĝis ĉirkaŭ Bariko-Lordo. Ĝi timis, sed pro certeco ne graŭlis.

“La hundo estas heroo,” esprimis sin la panjo de Georgo, tuj kiam ŝi ĉesis plori.

“Ĉu ĝi efektive apartenas al neniu? Ĉu tio estas ebla?” miris la paĉjo.

“Ĝi devas havi kolrimenon kaj markon,” diris iu.

Nenion similan ĝi havis.

“Ĝi estas gardanĝelo,” diris iu maljunulino.

Kiel tio finiĝis. Ĝi ne povis finiĝi alie. Bariko-Lordo restis ĉe Georgo kaj liaj gepatroj kaj nomiĝis nun Heroo. Ĝi fartis bone, Georgo tenis sin al ĝi, kvazaŭ ili de ĉiam apartenus al si, kaj post ferioj la tuta familio veturis en Pragon.

“Ni tamen volis havigi al Georgo gvidhundon,” rezonis la paĉjo kaj la panjo kaj rigardis kun ŝato, kiel Georgo kaj Heroo estas grandegaj amikoj.

“Sed ni devas instruigi ĝin por kondukanto de nevidantoj,” kompletigis la paĉjo.

Kaj tial ili ĉiuj tri tuj ekiris kun Heroo en hundlernejon. Ili miris, ke la hundo ĝoje bojas, kiam ili proskimiĝis al la lernejo.

“Ĉu vere, Bariko, kion ci faras ĉi tie?” alparolis ĝin la hundedukisto.

“Ĉu vi konas ĝin?” miris la panjo.

“Kial ne, ĝi estas nia Bariko. Verdire nia ne, jam unu jaron ĝi ne estas nia. Ĝi apartenas al sinjorino Dvořák.”

Kaj tiam Georgo ekploris:

“Ĝi apartenas al neniu sinjorino Dvořák, ĝi estas mia, mia.”

“Ĉu oni povus tion iel klarigi kaj aranĝi?” demandis la paĉjo.

“Mi ne scias,” diris la edukisto. “Sed mi tuj demandos. Kiel ĝi aperis ĉe vi?”

La panjo rakontis, kio okazis.

“Estas strange,” miris la edukisto. Kaj telefonis en la loĝejon de sinjoro Dvořák.

La aŭdilon levis lia edzino – kaj – kion ŝi komunikis, estis nekredinda. Sinjoron Dvořák trovis fungokolektantoj en arbaro, li estis ligita al arbo per kolrimeno de Bariko kaj bojis.

“Ekde tiu tempo li ne parolas, nur li bojas,” ploris sinjorino Dvořák.

La afero finiĝis tiel, kiel feliĉe por Georgo kaj Bariko-Lordo-Heroo ĝi finiĝi devis...

El la ĵus aperinta libro “Ŝimmi kaj aliaj simiaĵoj” tradukis Jiří Patera.

Mi serĉas ĉeĥajn bierajn etiketojn en bona stato por mia kolekto. Bonvolu skribi ĉeĥe, Esperante aŭ france al Dominuque Setillotte 49 rue de la Iere Armée F-68 190 ENSISHEIM FRANCE

Jiří Wolker

Balada o očích topičových

Utichly továrny, utichly ulice,
usnuly hvězdy okolo měsíce
a z města celého v pozdní ty hodiny
nezavřel oči svých jenom dům jediný,
oči svých ohnivých, co do tmy křičí,
že za nimi uprostřed strojů, pák, kotlů
a železných tyčí
dělníků deset své svaly železem propletlo,
aby se ruce a oči jim změnily ve světlo.

„Antoníne, topiči elektrárenský,
do kotle přilož!“

Antonín dnes, jak před lety dvaceti pěti,
železnou lopatou otvírá pec,
plameny rudé ztad syčí a letí,
ohnivá výheň a mládenec.
Antonín rukama, jež nad oheň ztuhly,
přikládá plnou lopatu uhlí,
a že jenom z člověka světlo se rodí,
tak za uhlím vždycky kus oči svých hodí
a oči ty jasné a modré jak květiny
v praménkách drátů nad městem plují,
v kavárnách, v divadlech, nejraděj nad stolem
rodiny v radostná světla se rozsvěcují.

„Soudruzi, dělníci elektrárenští,
dívnu ženu mám.
Když sejí do očí podívám,
pláče a říká, že člověk jsem prokletý,
že oči mám jiné, než jsem měl před lety.
Když prý šla se mnou k oltáři,
jak dva pecny velké a krásné byly,
teď prý jak v talířku prázdném mi na tváři
po nich jen drobinky dvě zbyly.“

Smějí se soudruzi, Antonín s nimi
a uprostřed noci s hvězdami elektrickými
na svoje ženy si vzpomenu na chvíli,
které tak často si dětinsky myslely,
že muž na svět přišel, aby jim patřil.

A Antonín zas, jak před lety dvaceti pěti,
jen těžší lopatou otvírá pec.
Těžko je ženě vždy porozumět,
má jinou pravdu a pravdivou přec.
Antonín oči květ v uhelné kusy přikládá,
neví snad o tom, - spíš musí,
neboť muž vždycky očima širokýma
se rozjet chce nad zemí a mít ji mezi nima
a jako slunce a měsíc z obou stran
paprsky lásky a úrody vjíždět do jejích bran.

Jiří Wolker

Balado pri okuloj de l' hejtisto

Trankvilaj fabrikoj estas, trankvilaj la stratoj,
ĉirkaŭ la lun' ekdormis steldukatoj
kaj en tuta la urbo, nun tiel malfrue
nur unu domo rigardas senbrue,
sed ĝiaj okuloj en mondon vokas,
ke mez' de maŝinoj muskolojn sufokas
plektante ilin per fero, dek laboreguloj,
volante ŝanĝi en lumon manojn, eĉ siajn
okulojn.

„Antonio, laboristo elektreja, metu karbon sub
kaldronon!“

Antonio, kiel antaŭ jaroj dudek kvin
malfermas pordeton de l' forno,
el kiu elvenas flamoj sen tim'
kvazaŭ pikanta dorno.
Antonio per sia de l' manoj ŝtalforto
karbon metis al fera retorto
kaj ke nur de l' homo la lumo naskiĝas,
ĉiam parto de liaj okuloj aliĝas
kaj okuloj tiuj bluaj kaj klaraj
kuras sur fadenoj de dratoj
en kafejoj, teatroj, sed pleje sur tablo de amatoj
lumigas korojn de lampoj centjaraj.

„Kamaradoj, laboristoj elektrejoj,
strangan edzinon mi havas.
Kiam siajn okulojn mi rigardas,
plorante, ŝi diras, ke malbenita
mi hom' estas, kaj tutle ŝanĝita.
Kiam kun mi al altaro ŝi iris,
ke ili kvazaŭ bulegoj brilis,
sed nun, en malplenaj teleretoj
restis nuraj paneretoj.“

Ridas kamaradoj, Antonio kun ili
kaj noktmeze, dum steloj elektraj ne ĉesas brili
pri siaj edzinoj por momento rememoras,
pri tiuj, kiuj infane al si sufloras,
ke vir' naskiĝis sole por ili.

Antonio denove, kiel antaŭ jaroj dudek kvin
malfermas pordeton de l' forno.
Malfacile estas kompreni al virin',
pikanta, sed tamen vera estas la dorno.
Antonio denove, eble senvole, sian okulon
metas en fajran, flamantan spegulon,
ĉar ĉiam per larĝaj okuloj la viro
volas senti de l' mond' varman spiron
kaj kiel suno kaj luno ambaŭdirekte
li volas per amradi' eniri ĝin tutrekte.

Jiří Wolker

Balado pri okuloj de hejtisto

Silentas la fabrikoj, silentas la bulvaroj,
ekdormis sur ĉielo la steloj sub lun-gardo
kaj en la tuta urb' en tiu temp' tardhora
ne fermis la okulojn nur unu domo sola,
ĝiaj okuloj krias tra nokt' per fajraj langoj,
ke tie inter maŝinoj, kaldronoj kaj feraj stangoj
dek laboristoj siajn muskolojn plektis kun
fero,
por ke l' okuloj kaj manoj fariĝu lumhelo.

„Antonio, hejtisto elektreja, karbon sub la kaldronon!“

Antonio, kiel antaŭ jaroj dudek kvin
malfermas la fomon per fera ŝovelilo,
ruĝegaj siblaj flamoj eksteren premas sin,
fraŭlo kaj fornego en fajrobrilo.
Antonio per manoj jam raspaj de ardo
almetas plenan ŝovelon da karbo;
kaj ĉar la lumo nur el hom' naskiĝi pretas,
li post ĉiu ŝovelo pecon de l' okuloj ĵetas
kaj tiuj okuloj klaraj, kun bluo cikoria,
tra faskoj de dratoj super la urbo cirkulas,
en kafejoj, teatroj, plej ŝate super rond' familia,
en ĝojplenaj lumoj ekbrilas.

„Kamaradoj, elektrej-laboristoj,
tre stranga estas mia edzin',
se mi en okulojn rigardas ŝin,
ŝi ploras kaj diras, ke damno min trafis,
ke mi ne havas okulojn, kiajn mi foje havis.
Kiam mi - ŝi diras - la geedziĝon festis,
ili estis grandaj kiel du panoj, kaj sciis bele
brili,
sed nun, kvazaŭ en plad' malplena en vizaĝ'
al mi restis
du etaj paneroj el ili.“

Ridas la kamaradoj, kun ili Antonio
kaj meze de nokt' kun elektrostelaj radioj
ili pri la edzinoj por moment' pensetas,
kiuj naive tiel ofte kredas,
ke vir' naskiĝis por aparteni al ili.

Kaj Antonio, kiel antaŭ jaroj dudek kvin
malfermas la fornon nur per pli peza fero.
Ne kompreneblas ĉiam la virin',
ŝi ankaŭ pravas, tamen laŭ alia vero.
Antonio la floron de l' okuloj kun karbo
hejtigas
verŝajne senscie, sed dev' lin instigas.
La vir' ja ĉiam emas super la ter' promeni
per larĝ-apertaj okuloj kaj inter ili ĝin teni
kaj kiel Sun' kaj Luno veturi tra l' Ter-pordoj
ambaŭflanke por lumo en am' kaj de
l' rikoltoj.

Právě vyšlo...

Vortoj de la Nokto - Slova noci

básnická sbírka Zdenky Bergrové v
esperantském překladu Jaroslava Mráze a v
grafické úpravě a s ilustracemi Věroslava
Bergra.

Mondo afabla ne nur al vortoj

výbor z básní Jiřího Karena „Svět laskavý nejen
na slova“ v překladu Jar. Mráze a
v grafické úpravě Zdeňka Wagnera.

*

La Nova Plena Ilustrita Vortaro de

Esperanto - nový úplný ilustrovaný slovník
esperanta vydala organizace „Sennacieca Asocio
Tutmonda“ v Paříži. Pod vedením docenta
Michela Duc Goninaze na slovníku
spolupracovaly desítky odborníků z celého
světa/mezi nimi i čeští esperantisté. Slovník má
1266 stran a v 16 780 heslech je pojednáno 46
890 lexikálních jednotek.

Dokumentaj Kreditoj

je esperantský překlad příručky o
dokumentárních akreditivách, který vydala
Esperantská odborná skupina pro obchod a
ekonomiku. Po pravidlech pro výklad dodacích
položek Incoterms 2000 (v esperantu
„Inkotermoj 2000“) je to další normativní
příručka Mezinárodní obchodní komory ICC v
esperantu.

**En januaro 2002 mortis la iama tre aktiva
membrino de nia klubo Soňa Hodková. Sian
E-bibliotekon ŝi donacis al la klubo.**

V tu chvíli Antonín, topič mozolnatý,
poznal těch dvacet pět roků u pece, u lopaty,
v nichž oči mu krájel plamenný nůž,
a poznáv, že stačí to muži, by zemřel jak muž,
zakřičel nesmírně nad nocí, nad světem vším:

„Soudruzi, dělníci elektrárenští,
slepý jsem, - nevidím!"

Sběhli se soudruzi přestrašení celí,
dvěma nocemi domů jej odváděli.
Na prahu jedné noci
žena s děckem sténá,
na prahu druhé noci
nebesa otevřená.

„Antoníne,
muži můj jediný,
proč tak se mi vracíš
v tyto hodiny?
Proč jsi se miloval
s tou holkou proklatou,
s milenkou železnou,
ohněm a lopatou?
Proč muž tu na světě
vždycky dvě lásky má,
proč jednu zabíjí
a na druhou umírá?"

Neslyší slepec, - do tmy se propadá
a tma jej objímá a tma jej opřádá,
raněné srdce už z hrudi mu odchází
hledat si ve světě jinačí obvazy,
však nad černou slepotou veselá lampa visí,
to není veselá lampa, - to jsou oči čísi,
to oči jsou tvoje, jež celému světu se daly,
aby tak nejjasněji viděly a nikdy neumíraly,
to jsi ty, topiči, vyrostlý nad těla zmučené
střepy,
který se na sebe díváš, ač sám ležiš slepý.

Dělník je smrtelný, .
práce je živá,
Antonín umírá,
žárovka zpívá:

Ženo má, - ženo má,
neplač!

Kaj Antonio ĵus tiun momenton
eksentis de l' dudek kvin jaroj la venton,
kiu en tranĉilo fajrosimila
parolis al viro pri morto trankvila
kaj li en nokton terure ekkriis:

„Kamaradoj, laboristoj elektrejaj,
mi blindiĝis - mi ne vidas. “

Alkuris kamaradoj
timigitaj tute,
tra du noktoj hejmen
lin gvidis mute.
Ĉe sojlo de l' unua nokto
virin' kun infano staris,
ĉe sojlo de l' alia nokto
ĉiel' sin preparis.

„Antonio,
karulo ĉiela,
kial revenas vi
dum nokto malhela?
Kial vi amis
knabinon feran,
koron inferan
en brusto ŝi havis.
Kial en mondo la vir'
du amojn varmigas,
unu li mortigas,
por alia perdiĝas lia spir'?" “

Ne aŭdas blindulo - falas en mallumon
kaj novan ricevas, nigran kostumon.
El brusto foriras kuraĝe la koro,
trankvile, sen iu ajn ploro.
Sed super la nigra blinduleco
brilegas lampo de heleco.
Ĝi ne estas gaja lampo, sed okuloj,
de via vivo brilas speguloj.
Vin mem vi rigardas karese,
kvankam vi restos blinda senĉese.

Laborist' mortema estas,
laboro estas viva,
Antonio nun mortas,
ampolo kantas:

Edzino, edzino,
ne ploru.

Tradukis Jiří V. Šamla, 1934

Regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha

okazas ĉiuĵaŭde en la kunvenejo en Praha 1,
Ve Smečkách n-ro 25, kun jena programo:
13-14 h Libera tribuno - novaĵoj pri Esperanto,
informoj ĝeneralaj, ambaŭlingve
14-16 h gramatiko kaj ekzercado de
konversacio - nur en Esperanto
16-18 kursoj por komencantoj - gvidas s-anino
Marta Šmidrkalová.

Ĵaŭde la 12-an de decembro okazos la jam
tradicia **Zamenhof-vespero kun krist-naskaj
kantoj**, kun gustumado de kristnaskaj dolĉaĵoj
kaj kaf-, te- kaj vin-trinkado. Ĉiuj nepre venu!

Ĉlenské příspěvky na rok 2003:

Příspěvky Klubu esperantistů v Praze pro rok
2003 jsou následující:

výdělečně činní členové i důchodci platí 80,-
Kč, nepracující důchodci, nezaměstnaní a
rodinní příslušníci (ti bez Bultena) platí 50,- Kč.
Dosud platný dobrovolný příspěvek pro
důchodce nad 70 let ve výši 10,- Kč je zrušen.
Příspěvky je možno platit hotově na schůzi
klubu nebo poštovní poukázkou, kterou na
požádání dodáme.

Zároveň je možno zaplatit i příspěvky Českému
esperantskému svazu: výdělečně činní 250,- Kč,
nepracující důchodci, nezaměstnaní a studenti
150,- Kč, rodinní příslušníci 70,- Kč (bez
Starta), nevidomí 25,- Kč, doživotní členství
ČES stojí 5000,- Kč, zápisné pro nové členy
svazu i pro nové členy klubu 20,- Kč.

BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Jiří Patera

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

C/o Jindřich Ondráček
Bubenská 17
170 00 Praha 7